




LA DEKSEPA

Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : France, 1 franc. - Etranger, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

BONAN JARON !

Bonan jaron al ĉiuj batalantoj por Esperanto deziras "La Dek-Sepa". Al ĉiuj membroj de nia Grupo ni esprimas niajn samideanajn kaj fundamentistajn sentojn, kaj esperas, ke ĉiuj partoprenos al la Deka Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Paris de la 2-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 1914, kaj sukcesigos tiun internacian festaron !

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

A partir du 7 Janvier 1914 nos réunions auront lieu tous les Mercredis, à 21 heures, SALLE VILLIERS, 64, rue du Rocher, à Paris (Métro: Villiers, Europe ou Saint-Lazare), dans un local particulier au 5^e étage. — Ascenseur. — Téléphone : Wagram 81-54.

Tous les Mercredis causeries ou discussions en Esperanto, jeux, musique.

700.006-B-Esp-
1914



+Z65201007

— 2 —

Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Grupo Esperantista du XVII^e Arrondissement de Paris.

SIÈGE SOCIAL : 179, Boulevard Pereire, Paris.

Avis important.

Nous prions les membres de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa » qui ne l'auraient pas encore fait, d'envoyer le montant de leur cotisation, soit en mandat, bon de poste ou timbres, à notre trésorier, Monsieur G. DANIEL, 2, rue Guersant, Paris XVII^e, *avant le 20 Janvier 1914*. Passé ce délai, notre trésorier fera recouvrer par la poste, ce qui entraînera des frais supplémentaires.

La cotisation est de 10 francs minimum pour les membres bienfaiteurs, de 5 francs pour les membres actifs et de 3 francs pour les membres associés.

Dixième Congrès Universel d'Esperanto

Paris — 2-10 Août 1914

La carte du Congrès coûtera 15 francs et 25 francs pour les personnes qui s'inscriront après le 1^{er} Juin 1914. La femme ou les enfants d'un congressiste paieront par personne 10 francs ou 20 francs après le 1^{er} Juin 1914. Ces derniers congressistes n'auront pas droit aux documents du Congrès.

Les adhésions sont reçues tous les Mercredis soirs aux réunions de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Salle Villiers, 64, rue du Rocher, Paris.



NIA HEJMO

Jam de longe mi karesis la revon doti nian karan « Dek-Sepa » per tute aparta hejmo, kie nia rondo familia povus senĝene interŝanĝi siajn ideojn, senti sin iom pli esperantisme grupita; kie, kvazaŭ en hejma salonb, oni povus ĉu legi, ĉu babiladi, ĉu fari muzikon, ĉu ĉe danci.

Tiu revo de mi-tiel longe jam karesata, ĵus efektiviĝas. En 1914 nia Grupo translokiĝas en la « Salle Villiers », 64, rue du Rocher, en vastegan ĉambregon, provizita je ĉiu moderna komforto.

En angulo belega fortepiano el la firmo Plejel majestestas, maldekstre troviĝas nia biblioteko jam sufiĉe riĉa en verkoj de diversaj aŭtoroj, kiu de nun ĉiam pliriĉiĝos, ĉar loko ne plu mankos al ni por lokigi novajn librojn acetotajn.

Ĉie elektra lumo funkciadas kaj permesas al ni ĉi-momente prezenti lumbildojn al niaj estontaj vizitantoj, kaj daŭrigi la serion de niaj ŝatataj paroladoj.

Estas decidite, ke *la lastan Merkredon de ĉiu monato* okazos artista vesperkunveno, intermiksita kun dancado por la gejunularo.

Mi varme deziras, ke senescepte, Esperantistoj, al kiu ajn grupo ili apartenu, venu pligrandigi la ĉeestantaron de nia familia rondo; ili estos ĉe ni tutkore akceptataj kaj povos mem konstati, ke gajeco estas la plej ĉefa regulo en niaj kunvenoj.

Vivu interamo per Esperantismo !

Vivu kaj prosperu nia kara « Dek-Sepa » en sia nova hejmo !

Henri de Coppet.

ERRATA

Dans le numéro de Novembre 1913 de la « Dek-Sepa » page 2, ligne 2, lire : Mercredi 19 Novembre, au lieu de : Mercredi 6 Novembre.

L'Esperanto à Paris et dans la Banlieue

La prochaine réunion des Groupes indépendants de Paris aura lieu le Jeudi 15 Janvier 1914, à 21 heures, au siège du « Groupe Fundamentiste Paris-Bastille », Café au Tambour, 10, Place de la Bastille, Paris.



Une réunion des membres de l'U. E. A. de la région parisienne a eu lieu, le Samedi 29 Novembre dernier, à la Mairie du IX^e Arrondissement de Paris.

Il a été décidé de créer des délégués d'arrondissement et des délégués de groupe, afin d'intensifier la propagande pour l'U. E. A. à Paris.



A partir du 1^{er} Janvier 1914, les réunions de l'Association Commerciale et Industrielle Espérantiste auront lieu à l'Hôtel du Globe, 71, rue Monge, à Paris, tous les lundis, à 21 heures.



La Section Espérantiste du Quartier Latin a changé le jour et le local de ses réunions. Celles-ci ont lieu tous les Mercredis, à 21 heures, 7, rue Casimir-Delavigne, Paris.

Bibliografie.

Oriente Almanako, kun antaŭparolo de B. Kotzin, redaktoro de « Ondo de Esperanto ». El la lingvoj araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hinda, hina, japana, kartvela, lezгина, sanskrita kaj tatara. Librojo Esperanto, 3, Lubjanskij proezd, Moskvo. — Prezo : 90 kop. (o Sm. 950) afr.

La intereso de l' verko konsistas en tio, ke en la Almanako oni trovas rakontojn, kies tradukoj ekzistas en neniu lingvo « natura ». S-ro Kotzin pensis, ke tre certe oni deziros retraduki alilingven parton de l' libro, kaj tiamaniere Esperanto pruvos ĝian praktikan utilecon. La libreto prezentas

bukedon el floroj ne samodoraj, kaj mi ne povas kontraŭstari la deziron, konigi al la legantoj de la « Dek-Sepa » en tiu numero unu el tiuj rakontoj, tradukita el la sanskrita lingvo.

Mi ne dubas, ke post legado, ili tuj acetos la verkon. Ĝi meritas sukceson pro la diverseco de la tradukoj, kiuj ĉiuj estas bonegaj kaj interesaj.

La historio de Savitri

(La plej konata kaj plej ŝatata historio el la nacia eposo.)

En la antikva tempo estis reĝo nomata Aŝvapati en la lando de Madra. Li estis religiema piulo, adoranto de la vereco, havanta la koron fermitan kontraŭ la sentobjektoj. Li plenumis siajn religiajn devojn kaj estis tutkore amata de siaj subuloj por sia bonfarado. Sed li ne havis idon⁽¹⁾. Tial li preĝis al la diino Savitri⁽²⁾ tre forte, ke ŝi donu al li idon. Post iom da tempo lia reĝino havis belan filineton. La patro kaj la saĝuloj donis al ŝi la nomon Savitri, ĉar ŝi estis donacita de la sundiino. Tiu reĝidino kreskis plena de beleco kaj de virto, kiel la diino de Fortuno mem, kaj post kelkaj jaroj ŝi estis belega junulino. Ŝi brilis kiel brilanta oro kaj la popolo kredis, ke ŝi estis vere diino, veninta sur la teron. La patro maltrankviliĝis pri sia edziĝo, li alvokis ŝin kaj diris : « Karega filino mia ! nun venas la tempo de via edziĝo. Mi tre ŝatus vidi vin edzino de bela edzo. Do elektu belan, boninstruitan, pian reĝidon, kiu indas vin ». Ŝi respondis : « Kara patro ! mi obeas ». Tuj ŝi ordonas, ke oni pretigu ŝian belan oran kaleŝon por la vojaĝo. Baldaŭ ŝi ekiris kaj vojaĝis tra diversaj landoj, vizitante diversajn reĝfamiliojn. Post kelka tempo ŝi revenis hejmen kaj iris en la kortegon por rakonti ĉion al la patro.

La patro sidis tie parolante kun la granda saĝulo Na-

(1) Estas trecege necese, ke la Hindu havu idon, precipe filon.

(2) La diino de la suno.

rada (3). Ĉirkaŭ ili sidis la reĝoficistoj kaj la saĝuloj. Narada vidis la reĝidinon kaj demandis Aŝvapati: « Kien iris via filino? de kie ŝi estas revenanta? Kial ŝi ankoraŭ ne edziniĝis? » Aŝvapati diris: « Ĝuste tial mi sendis ŝin, por ke ŝi vojaĝu tra diversaj landoj kaj elektu indan edzon por si mem. Ŝi ĵus revenis kaj bonvolu, via saĝula moŝto, aŭskulti ŝian rakonton ». Tiel dirinte li proponis al la filino: « Rakontu nun, karulino! »

Ŝi salutis profunde ambaŭ kaj komencis: « Estas en la Ŝalva lando reĝo nomata Djumatsena. Li malfortune blindiĝis. Kaŭze de tiu ĉi malfeliĉo kaj kaŭze de la infaneco de lia filo, nomata Satjavan, liaj malnovaj malamikoj ekkaptis la landon. Tiam li iris en la piajn arbarojn (4). Tie nun li vivas pian vivon kaj estas trankvila, pensante pri Dio. La filo de tiu Reĝa Moŝto, kiu kreskis en tiu ĉi arbaro, estas la edzo, kiun mi elektas ». Narada, aŭdinte tion, ekkriis: « Ho, malfeliĉo! Kial la saĝa Saviiri elektis tiun ĉi edzon? Ho, malfeliĉo! » Aŝvapati timante diris: « Kiu estas la malfeliĉo en tiu elekto? » Narada klarigis: « Vere li estas plena je bonecoj. Sed li havas nur unu malbonecon. Tute ja ne estas eble eĉ per grandega penado evitigi tion. Malfeliĉe lia vivo estos mallonga. Kaj precize post unu jaro li forlasos sian korpon ». Post tiaj teruraj vortoj de Narada Aŝvapati maltrankvile diris al la filino: « Idino mia! elektu do alian edzon, ĉar la elektita de vi havas tian grandan malbonecon ». Savitri diris: « La partigado de proprajoj, la edziniĝo de virinoj, kaj trie, la donaco al iu estas ĉiam netuŝebla. Do, ĉu li estu longvivulo aŭ mallongvivulo, ĉu boneculo aŭ malboneculo, mi elektis lin mia edzo kaj mi neniam elektos alian ». Narada diris: « Ho, Aŝvapati! tiu ĉi filino via estas unucelulino. Do mi kredas, ke estus plej bone, se vi donacus ŝin al Satjavan ». Tiel dirinte Narada reiris ĉielen.

La reĝo pretigis ĉion por la venonta edziniĝo de sia filino kaj kiam la tuto estis preta, li venis piede al la ermitejo de Djumatsena kune kun sia kara filino kaj saĝaj pastroj. Alveninte tien, li diris al la blindulo: « Mi alkondukas

(3) Li estis la plej granda saĝulo de la malnovaj tempoj, konsilanto kaj helpanto de ĉiuj reĝoj.

(4) En la malnova tempo, kiam oni maljuniĝis, oni retiris sin en arbaron por resti tie pripensante dion. Do la arbaroj estis plenaj de ermitejoj de tiaj maljunaj gepluloj.

mian filinon kiel edzinon por la filo de via Reĝa Moŝto ». La maljuna blindulo diris : « Ni estas senlanduloj kaj loĝas ĉi tie en arbara ermitejo, pensante pri Dio. Kiel povos la filino de via Reĝa Moŝto elporti la mizerecon de nia arbara vivado ? » Sed Aŝvapati ree kaj ree certigis al la maljuna reĝo, ke lia filino amas lian filon tutkore, kaj fine Djumatsena konsentis. Tiam ili invitis ĉiujn tieajn geermitojn kaj laŭ religia rito la edziĝo de la gereĝidoj estis solenigita. Aŝvapati donacis al la filino riĉan doton kaj ĝojplene reiris hejmen. Satjavan ankaŭ estis tute feliĉa, havante tian belan kaj saĝegan edzinon ; kaj ŝi mem estis tute kontenta, ĉar ŝi ricevis la amantan kaj korege deziratan edzon.

Post la foriro de sia patro ŝi flankenmetis la riĉajn vestaĵojn kaj ornamaĵojn, sin vestinte per la ermitaj vestoj, faritaj el arbŝelo. Kaj la gepatroj de la edzo estis tre feliĉaj de ŝia zorgo kaj amo pri ili. Nun alvenis la tempo de la morto de Satjavan laŭ la parolo de Narada. Ŝi kalkulis, ke restis ankoraŭ kvar tagoj kaj ŝi decidis fordoni sin dum tiuj lastaj kvar tagoj al preĝo kaj fasto. La maljunaj gebopatroj ne komprenis tion kaj demandis ŝin pri la kaŭzo. Ŝi diris : « Karaj gepatroj, ne timu, mi faris solenan promeson kaj mi plenumos ĝin decideme. La veran kaŭzon mi klarigos al vi post kvar tagoj ». Je la tago, kiam Satjavan devis morti, ŝi levis sin fruege, kaj post bano kaj preĝo ŝi salutis ĉiujn gepiulojn, salutis siajn bogepatrojn, kaj ricevis ilian benon : « Neniam estu vidvino ! »⁽⁵⁾ La bopatro diris : « Filineto ! Jam estas la kvara tago de via fasto ; nun estas tempo por manĝi, do manĝu ». Ŝi diris : « Ne, patro kara ! mi decidis ke mi fastu ĝis la subiro de la suno hodiaŭ ». Dume, Satjavan prenis hakilon kaj eliris por alporti lignon el la arbaro. Savitri treege deziris iri kune. Li diris : « Se vi deziras, mi ne kontraŭdiros, sed la gepatroj eble ne deziras, ke vi eliru. Do, demandu ilian permeson ». Ŝi demandis kaj ricevis la permeson de la gepatroj kaj iris en arbaron kun la edzo.

La riĉkoloritaj floroj, la dolĉe fluanta rivero kaj la verdaj arboj treege plaĉis al la geedzoj. Satjavan unue kolektis fruktojn por la gepatroj kaj poste komencis haki la arbojn por ligno. Kaŭze de la arbaro kaj de la varma suno li havis

(5) Ĝi estas la plej granda beno por hinda edzino. Oni ankaŭ kredas, ke la beno de piulo kaj ermito estas ĉiam plenumota.

kapdoloron. Li diris : « Kredeble mi malsaniĝas kaj mi deziras ekdormi, ĉar mi ne povas stari ». Savitri ĉiam preta por servi al la edzo, metis lian kapon sur sian bruston kaj sidigante sur la tero kantis dolĉe al li, ĝis li ekdormis. Post kelka tempo ŝi vidis la teruran, nigravizaĝan, ruĝokulan dion de morto, kiu havante kaptoŝnuron en la mano, staris apud Satjavan. Rigardante lin, ŝi demandis : « Mi kredas, ke via moŝto estas morto. Tiu ĉi korpo via ne estas homa. Diru al mi, kiu vi estas kaj kion vi deziras ? » Li responde diris : « Jes, mi estas morto. Mi deziras ekkapti la vivon de Satjavan, ĉar lia tempo sur la tero estas finigita ». Tiel dirante Jama ⁽⁶⁾ poste eltiris el la korpo de Satjavan fingrolarĝan hometon kaj ligante lin per la ŝnuro li ekiris suden ⁽⁷⁾. Savitri plena de grandega malĝojo postiris. Jama vidis ŝin kaj diris :

« Ho, Savitri ! revenu hejmen kaj faru la funebrajn ceremoniojn pro via edzo, vi jam plenumis vian devon pri la edzo. Jen la limo, kiun homo vivanta ne povas transpasi ».

Savitri diris : « Kien oni alkondukos mian edzon aŭ kien li mem iras, tien ankaŭ mi iros kune. Ĝi estas nepra devo de edzino.

La saĝuloj diras, ke post sep paŝoj estas amikeco kun bonuloj ; do aŭskultu, kiel amiko, miajn vortojn :

« La malsaĝuloj vagadas en arbaroj kaj kredas, ke per nura vagado, fasto kaj sinturmento oni estas libera ; sed la saĝuloj diras, ke komprenante kaj farante la religian devon oni atingas la celon de l'vivado ; tial metas la bonfarantaj saĝuloj religian devon en la unuan rangon ».

Jama diris : « Revenu hejmen, mi ŝatas aŭskulti viajn belajn vortojn, tiel bone diritajn. Esceptinte la vivon de Satjavan, elektu kiun ajn deziron, mi certe ĝin plenumos ».

Savitri diris : « Senlandulo kaj blindulo, mia kara bo-patro, loĝas en la arbaro kiel ermito. Mi deziras, ke li estu forta reĝo kaj rehavu siajn okulojn : per via bonaĵo li estu brilanta kiel suno ».

Jama diris : « Ho, brava filino ! mi donas al vi ĉion deziritan. Mi vidas, ke vi estas lacigita pro la longa vojo, — revenu, vi ne devus vin lacigi ».

(6) Nomo sanskrita de morto.

(7) Jama loĝas en la suda ĉielo.

Savitri rediris : « Kiel estus laciĝo apud mia edzo ? mia vojo estas certe sama kiel la lia. Mia vojo estas ĉiam tien, kien vi lin alkondukas. Ho, dia moŝto ! aŭskultu ankaŭ mian pluan parolon :

« Kun la virtuloj la unua konatiĝo estas tre dezirinda ; poste oni iĝas ilia amiko, kaj amikeco kun virtuloj estas ĉiam fruktoplena. Tial oni loĝu ĉiam kun la virtuloj.

« La nepra devo de la virtuloj estas amo al ĉiu vivaĵo, montrita per ago, vorto kaj penso, kaj la dua devo ilia estas bonfarado ».

Jama diris : « Kiel akvo por soifantoj estas via parolo por miaj oreloj. Do ankaŭ esceptinte lian vivon, elektu vian duan deziron, ho, virtulino ! »

Savitri diris : « Mia patro, la reĝo de la mondo, restas sen filoj ⁽⁸⁾. Mi deziras, ke li havu cent saĝajn filojn, kiuj faros lian nomon honorinda tra la tuta mondo ».

Jama diris : « Via patro certe estos patro de cent famaj, saĝaj filoj. Nun estas viaj deziroj plenumitaj. Ho, reĝfilino ! revenu, vi jam iris longan vojon ».

Savitri diris : « Ne estas la vojo longa por mi kun mia edzo, mia penso estas ĉiam kun li. Kaj mi plu diros ion al via moŝto :

« Vi estas la forta filo de Vivāsvat ⁽⁹⁾, tial oni nomas vin Vajvasvata ⁽¹⁰⁾. Vi gardas la popolojn kun egala justeco, tial vi estas la Dharmaraĝa ⁽¹¹⁾ [la Reĝo de Justeco].

« Vi ankaŭ gardas la popolojn per justaj reguloj, kaj vi ilin kondukas sur la vojo de la Vero, tial oni nomas vin Jama [la vera kondukanto].

« Oni konfidas al la virtuloj pli ol al si mem, kaj tial ĉiuj deziras nepre la helpon kaj la konsilon de la virtuloj ».

Jama diris : « Ho, bona virino ! mi neniam aŭdis, krom de vi, tiajn vortojn. Mi estas ĝojplena. Do, elektu la trian deziron, esceptinte la vivon de Satjavan ».

Savitri diris : « Mi deziras cent gloriĉajn filojn, kiuj portos la nomon de mia edzo, kaj kiuj etendos tra la tuta mondo la famon de lia familio. Ĝi estas la tria deziro ».

(8) Vidu noton 1-an sur la paĝo 5.

(9) La suno.

(10) Signifas « filo de la suno ». Estas nomo de morto.

(11) Estas alia nomo por morto.

Jama diris : « Ho, belulino ! Vi havos cent gloriĉajn filojn, kiuj trovos grandan famon en la mondo. Mi ne deziras lacigi vin, do revenu, reĝfilino, vi jam iris longan vojon ».

Savitri diris : « La virtuloj estas ĉiam religiemaj kaj rajtemaj, ili neniam estas malfeliĉaj kaj neniam funebraj. La kunveno de virtuloj kun virtuloj neniam estas senfrukta. La virtuloj neniam timas apud virtuloj. La virtuloj neniam timas kontraŭagon, ĉar ili agas ĉiam kiel Arioj ⁽¹²⁾ kaj bonfaradas ».

Jama diris : « Kiam vi diras tiamanierajn vortojn, plaĉante al mia koro, tiam kreskas mia admiro pri vi. Ho, senegala ĉastulino ! demandu kion ajn via koro deziras ».

Savitri diris : « Mi ne deziras feliĉon sen edzo, mi ne deziras taglumon sen edzo, mi ne deziras fortunon sen edzo, mi ne deziras ĉu vivon sen edzo.

« Vi mem promesis al mi laŭ mia deziro cent filojn gloriĉajn, kaj vi forprenas mian edzon. Mi elektas, ke mia Satjavan revivu, tiel via promeso estos plenumata ».

Jama diris : « Tiel estu » kaj malligis la ŝnurojn. Salutante Savitri, li diris : « Ho, ĝojo de via familio ! jen mi forlasas vian edzon. Vi ambaŭ vivos kune longajn jarojn ». Tiel dirinte, li reiris sian lokon. Post lia eliro Savitri revenis en la arbaron, kie kuŝis la korpo de Satjavan, kaj rigardis lin amoplene. Tiam li rekonsciigis kaj avide demandis ŝin : « Kien iris la nigrulo, kiun mi vidis ? Kiam mi ekdormis sur via brusto, mi vidis teruran, sed brilantan personon. Ĉu estis songo aŭ ne ? » Savitri ridetis kaj respondis : « Mia karulo, nun ni devus reveni hejmen, ĉar la nokto jam aperis kaj niaj gepatroj maltrankviligos. Morgaŭ mi rakontos al vi la tuton ».

Tradukis el la sanskrita lingvo

IRACH JEHANGIR SORABJI.

Benares (Hindl.)

(El *Orienta Almanako*).

(12) Aria (nobla) estas la pranomo de la hinda raso. La nomo signifas ĉiun bonan econ. Do agi kiel Arioj estas la plej alta idealo de la hinda vivado.



N.-B. — La Rédaction de *La Dek-Sepa* désire acheter les Numéros suivants : N° 2 (Janvier 1911); N° 7 (Juin 1911); N° 12 (Janvier 1912); N° 13 (Février 1912); N° 14 (Mars 1912); N° 24 (Mars 1913).

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

- L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de
2800 phrases de la vie usuelle fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,
édition pour tenor ou soprano fr. 1,50
-
-

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro. Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la ag-
atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŭro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

KONTRAŬ
M A R -
M A L -
S A N O

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ
F E R V O J -
M A L -
S A N E T O

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la Grandan
Premion de la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en
Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla de S-ro WHITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.



Vera
 Ferhava Sala
 alsimiligobla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
Fer Robin

mirinde efikas
 KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ
 Akcelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉe ĉiu mango, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la botoleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
 POSTULU la ROBIN

VENDEJO POGRANDE:
 13, Rue de Poissy, PARIS